

## Preĝo rilate la viruson

Tenu nin, Sinjoro,  
sub la ombro de via kompato  
en tiu tempo necerta kaj malĝoja.  
Subtenu kaj apogu la malkvietajn kaj timemajn,  
kaj levu supren tiujn, kiuj malleviĝas;  
tiel ke ni ĝoju pro via konsolo,  
sciante, ke nenio nin apartigos de via amo.  
Pro Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

**Amen**

Tradukis Jack Warren  
Kun la permeso de la  
Anglikana Eklezio en Britio  
Fonto: churchofengland.org



Václav Lamr: Madono kun masko

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,  
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

## Enhavo

Hereza evangelio	75
Enkonduko al la Evangelio laŭ Maria [Magdalena]	80
František Alexander Elstner, ĉeĥa skolto-motoristo	87
Kiel mi travivis la strangajn tempojn dum la virusa pandemio	89
Letero pri la pandemia malsano KOVIM-19	91
KOVIM-19-pandemio: kio sekvas por la eklezio?	92
Neniu kongreso, sed retaj diservoj	94
Liturgia muziko	95
Venu, Spir', kaj faru novaj	96

## Redaktoraj vortoj

**K**ara leganto, la pandemio nin ĉiujn forte frapis. Tion ni spertis jam en pasinta numero de Dia Regno, kie ni povis legi la atestojn de kelkaj legantoj. Ankaŭ en tiu ĉi numero vi trovas artikolojn pri la sama temo, kaj certe ni por longa tempo devos nin adaptiĝi al la nova situacio. Mi volonte akceptos pli da raportetoj de vi.

Unu grava konsekvenco de la pandemio estis la prokrasto de nia planita kongreso al la sekva jaro, 2021. Ni esperas, ke ni tiam povos aranĝi la kongreson.

Alia, sed gajiga konsekvenco, estas, ke kvar retaj diservoj estas produktitaj kaj ilin eblas aŭskulti surrete. Vi vidos la ligilojn sur paĝo 94. Kaj pliaj estas planitaj.

Krome vi trovas aliajn interesajn artikolojn ĉi-numere kaj mi deziras al vi bonan legadon.

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

# Hereza evangelio

Prelegserio de József Farkas, hungara reformita pastoro, aŭtune 1969

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Moto:

Laŭ liaj samtempuloj Jesuo estis herezulo, nur poste lia instruo fariĝis evangelio. Kiam Luther komencis prediki la nove ekkomprenitajn evangelion, oni akuzis lin pri herezo, nur poste lia scio fariĝis reformatora pravo. Kiu kuraĝas hodiaŭ prediki tiun herezan evangelion, kiu morgaŭ fariĝos ĉiutaga pano al kristanoj?

## Ni ĉiuj erarvadis

*Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon; kaj la Eternulo ĵetis sur lin la kulpon de ni ĉiuj.*

Jesaja, 53:6

**I**am oni demandis homon: “Kial vi ne plu legas la Bibliion? Antaŭe vi regule legis, kio okazis kun vi, ke neatendite vi finis la legadon?” Kaj li respondis: “Mi realizis, ke la Biblio estas granda arbaro: ĉiuj trovas en ĝi iun bastonegon, per kiu li povas bati la aliulojn. Mi eliris el tiu ĉi ludo, mi ne plu legas la Bibliion.”

Kiam mi rememoris pri tiu ĉi historieto, mi pensis, ke eble mi devus komenci tiun ĉi serion per pardonpeto. Mi devus elpeti pardonon de ĉiuj homoj, kiujn per iu biblia-bastonego oni jam

batis. Kaj mi faras tion, mi pardonpetas! Pardonpetas, egale, ĉu vin batis mi aŭ aliaj. Mi petas pardonon, se en la nomo de Dio oni estis krudaj kun vi, se en la nomo de Dio oni estis perfortemaj kun vi. Pardonu tion, forgesu tion kaj permesu al mi, ke ankoraŭ unufoje – nun jam per alia maniero – alproksimigu al vi Dion. De Jesuo mi tiel ekkonis Dion, ke li estas nia amata Patro, kiu neniun volas bati, kondamni. Kontraŭe: Li tiel multe amas nin, vin, min, ke ni ne povas tion bone esprimi. Lia penso estas, ke ni vivu, resaniĝu al nova vivo. La amon de tiu ĉi Dio mi ŝatus proklami dum tiu ĉi preleg-serio. Do mi petas vin ĉiujn, ke vi elvenu el la ombro de la antaŭaj vundoj, malbonaj memoroj, kaj ke vi per libera, malfermita animo akceptu miajn prelegojn.

Mi kompreneble tiel devas daŭrigi, ke Dio, kiel bona doktoro unue starigas la diagnozon kaj nur poste venas la kuracado. Starigi la diagnozon eble estas dolorige, sed ĉion ni eltenas, se ni sentas la amon kaj resanigan volon de Dio.

La diagnozo baze estas simpla, ni legis en tiu ĉi verso: “ni ĉiuj erarvadis”. Atentu pri la vortoj: ni ĉiuj! Ne temas pri tio, ke estas grupo – ekzemple la konvertiĝintoj, la kredantoj, la kristanoj – kiuj predikas la diagnozon al la alia grupo: “Ni estas tiuj, kiuj ekkomprenis, ke vi erarvadis”. Ĉu vi komprenas? Tio estus la evangelio de la bastonego. Ni ĉiuj erarvadis, kaj en tiu “ni ĉiuj” estas kaj la kredanta kaj la nekredanta parto de la mondo. Kaj kredante ni erarvadis kaj nekredante ni erarvadis de Dio. Nun la amo de Dio ĉirkaŭbrakas kaj volas resanigi nin kaj el la kredanta kaj el la nekredanta erarvagado.

Se iu ekkoleras pri tiu, al tiu mi silente, sed per plena konvinko diras, ke de Jesuo mi lernis tiun ĉi vidmanieron, ĉar Li tiel vidis la homaron. Pensu pri la parabolo de la ‘malŝparema’ filo! Du filoj rolas en tiu ĉi parabolo (Luko 15:11-32): unu el ili foriris kaj malŝparis sian heredaĵon – li tiel erarvadis. La alia filo restis hejme – kaj hejme erarvadis. Malantaŭ lia bela obeemo estis aflikto kaj ribelo. Same eblas erarvagi kaj en la proksimeco de Dio, kaj fore de Dio.

Mi ŝatus per vere simpla bildo klarigi ĉi tion, kiu parte venas el alia parabolo de Jesuo, parte estas libera de tiu parabolo. Mi pensas pri la parabolo pri la nuptofesto de la reĝa filo. Jesuo multe ŝatis la penson, ke en la mondo de Dio, en la nova mondo, la plena homa vivo estas tre bona. Tio, kion li kunportis al la homoj, estas kiel nuptofesto, eĉ: reĝa nuptofesto. Ni vigligu la atmosferon de tiu ĉi bildo en ni mem. Kion signifas la bildo: reĝa nuptofesto? Lumon, gajan

societon, ŝercojn, plenplenajn tablojn, grandan feliĉon. Tiun ĉi bildon mi uzas, kiam mi klarigas, kion signifas laŭ mi, ke ni ĉiuj erarvadis. Ni estas invitataj al la reĝa nuptofesto, kaj ni ja ekiris al la nuptofesto, sed ni atingas nur la ĉambron de la servistoj. Per unu-du pordegoj fore estas la reĝa nuptofesto, sed ni bariĝas je la servista ĉambro.

Ni ĉiuj erarvadis, unu el ni en unu servista ĉambro estas malfeliĉa, alia homo en alia ĉambro. Mi ne diras, ke ni turnis nian dorson al la reĝa nuptofesto, ke ni ricevas nenion el la nuptofesto. Restaĵoj iras ankaŭ al la servista ĉambro. Mi ne diras, ke nenion ni ricevas el la vera vivo, mi diras, ke tre malmulte ni ricevas. Ni alvenis nur al la ĉambro de la servisto. Ni eĉ povas konsoli nin mem, ke nia sorto ne estas tiel malbona en la servista ĉambro de la reĝa nuptofesto, tie ni tamen povas satiĝi. Eblas per tiu ĉi filozofio pravigi nian nunan staton, sed mi petas vin, ke ni ĉesigu tiun ĉi membravigadon. Ni konsciigu, ekkomprenu, ke: ni estas invitataj, ni havas propran, rezervitan lokon je tiu mirakla dia festego, kaj ni bariĝis, restis en la servista ĉambro.

---

Estas granda diferenco  
inter la erarvagado de la  
religiemaj kaj la  
nereligiemaj homoj.

---

Mi diras kelkajn ekzemplojn. La hodiaŭa homo havas grandan feliĉon: la teknikon. Certe la tekniko gvidas nin al ia savo. Sed mi diras, ke la tekniko gvidas nin nur al la servista ĉambro, ne pluen. Nur per la tekniko ne eblas ricevi parton de la vera, altnivela homa vivo.

Aŭ ni pensu pri la moralo! Ankaŭ la moralo gvidas nin nur ĝis la servista ĉambro, per la moralo neniu iras al la

reĝa nuptofesto. Kompare kun la dia amo – la moralo estas nur la servista ĉambro. La eklezio fermas la homojn en la servistan ĉambron de la moralismo. Ankaŭ per la religiaj ceremonioj ni povas iri nur ĝis la servista ĉambro.

Ni haltu iom, kaj ni ĉiuj bone trapensu, ĉu ni akceptas la diagnozon pri ni mem? Mi ne diras, ke tio, kion ni havas estas nenio. Tio estus malsaĝa kaj malprava parolo. Mi diras tion, ke kion ni havas estas *malmulte!* Dio pensis pri pli multo! La vivo estas pli ol kion ni atingis. Ni estas en la servista ĉambro. Ie ni devus trovi la elirejon, la trairejon, ĉar per unu-du pordoj fore estas la reĝa nuptofesto kaj ni devus atingi tion. Tio estus la pleniĝo de nia vivo. Ni ĉiuj erarvadis.

Estas granda diferenco inter la erarvado de la religiemaj kaj la nereligiemaj homoj. Mi provas montri tiun ĉi diferencon per cent kaj cent malgajaj spertoj. Kiel erarvagas la kredantaj kaj la nekredantaj homoj? Tiel, ke la kredantaj homoj *ne kuraĝas vivi*, kaj la nekredantaj homoj *tro multe volas vivi*.

La kredantoj tiel erarvagas, ke ili ne kuraĝas vivi, ĉar laŭ ili, Dio ne permesas ilin vivi. Ili ne rajtas fari tion, kaj ankaŭ ne rajtas fari tion ĉi. Ili devas atenti pri tio kaj ankaŭ devas atenti pri tio ĉi. La tuta mondo estas plena de kulpo kaj diablo. Plej bone fermiĝi kaj eble plej malmulte moviĝi. Tiu ĉi estas la erarvado de la kredantaj homoj. Ĉu vere Dio tiel pensis? Ĉu li kreis nin ne vivi?

Kaj la mizero de la nekredantaj homoj estas, ke ili tro multe volas vivi, kaj ili tiel eraras, erarvagas.

En tiu ĉi situacio sonas la belega evangelio. Kion mi ĝis nun diris, estas la diagnozo. La evangelio estas, ke kiam ni erarvadis, Dio sendis post ni Iun. Sendis post ni Iun al la servista ĉambro, al la homa vivformo. Li sendis Jesuon, ke

Jesuo gvidu nin al la nuptofesto, al la vivo. Tiu ĉi estas la granda ĝoj-mesaĝo, evangelio de la tuta Sankta Skribo, kaj tiun mi volas diri al vi. Jesuo estis inter la reguloj de la religio, kaj samtempe li estis tute libera de tiuj reguloj.

Nun ni devas fari dolorigajn klarigojn. La evangelio estas, ke Dio ne lasis nin perditaj, sengepatre, li sendis post ni Jesuon. La Biblio plurfoje diras tion, kaj per pli facilaj, kaj per pli malfacilaj vortoj. Pri ĉi tio temas la legita Jesaja 53, sed ni pensu pri la parabolo de la bona ŝafisto (Mateo 18)! La bona ŝafisto postlasas la naŭdek naŭ kaj iras serĉi la centan, kiu erarvadis. Ĝis tiam li serĉas la vagantan, ĝis kiam li trovas ĝin, levas ĝin kaj kun ĝojo diras: *perdiĝis sed troviĝis!* Per diversaj vortoj diras tiun ĉi evangelion la Biblio, ke ni erarvadis, sed Dio ne lasis nin solaj, Li sendis al ni en la servistan ĉambron Jesuon.

Kion signifas, ke Dio sendis al ni sian Filon? Kiel ni komprenu la servon de Jesuo? Tiun ĉi mi denove devas klarigi, kaj eblas ke la klarigo estos doloriga al kelkaj, sed estas necesa al ni ĉiuj. Unue nur formale mi diras: Dio pro tio sendis Jesuon, ke Jesuo helpu al ni. En tiu ni ĉiuj samopinias. Sed kion signifas la helpo de Jesuo? Jesuo ne venis por tio, ke Li faru ĉiujn homojn kredantaj, Li venis por tio, ke Li instruu nin *vivi*. Mi bone scias, ke dogmatike eblas kontraŭargumenti la duan parton de la frazo, do mi tuj korektas ĝin. Kion Jesuo kunportis, estas pli ol leciono, kiun eblas lerni. Tiel eblas pli precize diri: Jesuo venis por tio, ke Li *vivigu* nin. Li venis ne por anstataŭ malnova religio kunporti novan religion, al kiu fariĝis lia afero. Li diras, ke "... mi venis, ke ili havu vivon – vivon abundan." (Johano 10:10). En alia loko li diras: "Mi estas la restariĝo kaj la vivo" (Johano 11:25). Do

Jesuo Kristo estas, en kiu Dio montras la vojon *el* la servista ĉambro *al* la vera vivo, al la reĝa nuptofesto. Tio estas la demando: kiel faras tiun ĉi servon la Nazareta Jesuo?

Mi diras tri vortojn: pordo malfermiĝas, kaj turniĝas sur tri ĉarniroj. Sur tiuj ĉi tri vortoj turniĝas la erarvaginta vivo al la reĝa nuptofesto: *realo, fantazio kaj Sankta Spirito*. Tiel ni povas iri el la servista ĉambro al la reĝa nuptofesto, ke el iluzioj, el revaĵoj, el (religia kaj ateista) superstiĉoj ni alvenos al la realo. Sen la sperto, sen la travivo de la realo ne ekzistas reĝa nuptofesto. Kian grandan vojon la kredantaj homoj devas fari, ke ili el la mondo de la religiaj superstiĉoj iru al la realo!

Realo plus fantazio plus Sankta Spirito Ekkoni la realon estas malmulte. La ekkono de la realo helpas nin kompreni, ke la vivo estas pli komplika, pli bela kaj pli malbela ol ni pensis. Ĉar la pli plena realo samtempe montras belecon kaj malbelecon, profundecon kaj altecon. Ni devas bone kompreni la realon, sed tio estas nesufiĉa. Al la kristanismo bezonas ankaŭ fantazio: malantaŭ la jam bone komprenita realo ni devas vidi la eblecon. Devas ekkompreni, ke la realo ne estas stabileco, ne estas statika (staranta), la realo estas movanta, iras ien. Per la helpo de la fantazio eblas vidi, kien el tiu ĉi realo, kie vi nun estas, vi povus iri! Se iam vi vere renkontiĝus kun vi mem, unue vi ektimiĝus, sed tio tamen estas bona, ĉar tie povus komenciĝi via resaniĝo. Sed renkontiĝi kun vi mem sen fantazio estas katastrofo, malespero. Multaj homoj tiel fariĝis memmortigisto, ke antaŭe ili nur

revis pri si mem, kaj neatendite ili vere renkontiĝis kun si mem.

Realo plus fantazio: per malfermitaj okuloj vidi la kaŝitajn eblecojn. Kiel Jesuo en la leprulo, en la adultulino, en la impostisto vidis, kiaj ili povas estiĝi. Analfabetaj fiŝkaptistoj fariĝis apostoloj! Kia fantazio bezonis al tio! Kiel kompatinda estas la senfantazia pensmaniero de la farizeoj: per tiu ĉi ĉifonularo Jesuo volas ion? Kiam en la lumkorto de la fantazio ni vidas la realon, tiam ni vidas la “pli-on”. Laŭ mia kredo tiu ĉi estas la gvida vorto de Jesuo: “Ĉar la vivo estas pli ol...” (Luko 12:23).

---

**Analfabetaj fiŝkaptistoj  
fariĝis apostoloj! Kia  
fantazio bezonis al tio!**

---

Ni devas vidi la belan kaj malbelan realon mem, sed poste ni devas malkovri la “pli-on”, kiu ĉirkaŭas per lumkorto la realon kiel ebleco, kiel dia penso. Realo plus fantazio – kaj bezonatas ankaŭ la potenco de la Sankta Spirito. Pere de la Sankta Spirito la lumkorto fariĝas realo. Kio hodiaŭ estas nur fantazio, morgaŭ per la helpo de la Sankta Spirito fariĝos dia realo.

Ferme mi rakontas historion, por ke vi pli bone povu kompreni mian penson. Oni skribis pri Sankta Francisko, ke iam loĝantoj de unu urbo kolere kunportis antaŭ lin prostituitinon, dirante, ke estas terure, kiom da damaĝo tiu ĉi virino faras al nia urbo. Faru ion, Francisko, ne eblas plu elteni la kulpon de tiu ĉi virino. Francisko forsendis la homojn ke li povu

esti sola kun la virino, kaj diris al ŝi: venu, sidu apud min kaj diru al mi, ĉu estis en via vivo viro, kiun vi vere amis? Miris la virino kaj respondis: jes, mia sinjoro, estis. Francisko tiel respondis: mia fratino, ne diru al mi ‘Sinjoro, la sinjoroj pereigis min’. Sed diru, kiu estis tiu viro, ĉu vi amis lin? Kaj la virino rakontis al li, kiel ekfloris la pura amo en ŝia koro kaj kiel tretis sur ĝin la homoj, kiel malebligis ilian belan amon kaj kiel ŝi fariĝis prostituitino. Francisko aŭskultis ŝin kaj komencis plori. Fine diris al ŝi: iru, vi estas pli pura ol ni ĉiuj.

Ili du, dum tiu ĉi interparolo estis tie, je la reĝa nuptofesto. Ĉu vi scias, kio estas la reĝa nuptofesto? La ĝojo kaj la ĉiela beno de tiaj interparoloj. Kaj vi rimarku, ke ankaŭ al ili sur la tri ĉarniroj malfermiĝis la pordo. Realo: kiu estis tiu ĉi virino? Ĉu ŝi vere estis tia malbona, fia homo, kiel la homoj de la urbo pensis? Ĉu la urbanoj havis bonan okulon,

vidi la realon? Ĉu ne tio estis la problemo, ke la urbo erarvadis? Ankaŭ la virino erarvadis, sed ĉu ne la tuta urbo erarvadis, kiam ili juĝis ŝin? Ni ĉiuj erarvadis: kaj la urbanoj kaj la virino – kaj tiam venis Sankta Francisko, kiu serĉis la realon: kiu vi estas, virino? Kaj la realo malfermiĝis, kaj li per larmaj okuloj vidis, kiu loĝas en tiu ĉi virino. La Sankta Spirito per profana vorto signifas, ke Francisko amis tiun ĉi kompatindan virinon. Tiel amis, ke en la amo estis Sankta Spirito, kaj tiel amis, ke okazis resaniĝo.

Benu nin, nia Sinjoro, ke ni rimarku: nia vivo stopiĝis, bariĝis en la servista ĉambro kaj ke vekigu en ni la sopiro: Venu, Sinjoro Jesuo Kristo, malfermu la pordon kaj trakonportu ankaŭ min al la reĝa nuptofesto!



## Por malsanuloj



Dio de kompto,  
ni konfidas al via zorgo  
tiujn, kiuj malsanas aŭ suferas doloron,  
sciante, ke kiam ajn minacas danĝero,  
Viaj brakoj porĉiame apudas por sekurigi ilin.  
Konsolu kaj resanigu ilin,  
ĝis forto kaj vigliĝo;  
pro Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

**Amen.**

Tradukis Jack Warren  
Kun la permeso de la  
Anglikana Eklezio en Britio  
Fonto: churchofengland.org

# Enkonduko al La Evangelio laŭ Maria [Magdalena]

Gerrit Berveling, NL

La 23an de aprilo 1985 okaze de la jarkunveno en Dordrecht, Nederlando, de la Remonstranta Virin-Kontakto, kiel pastoro mi faris prelegon. Por tiu prelego mi elektis la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*. La reagoj, kiujn ĝi vekis, donis al mi la impreson, ke estos eble senchave, traduki mian prelegon ankaŭ en Esperanton, por ke internacie oni ankaŭ legu ĝin. Tial en majo 1985 mi aperigis ĝin kiel n-ron 8 en mia serio *Voĉoj Kristanaj*<sup>1</sup>.

Kelkaj titoloj fundamente gravaj ĉi-terene:

Hans Jonas – *The Gnostic Religion*, Boston, 1963

Elaine Pagels – *The Gnostic Gospels*, 1979; Nederlanda traduko: *De Gnostische Evangeliën*, Amerongen, 1985

Gilles Quispel – *Gnosis als Weltreligion*, Leiden, 1951

James M. Robinson (red) – *The Nag Hammadi Library*, Leiden, 1977

Aurelio de Santos – *Los Evangelios Apócrifos*, edición crítica y bilingüe, Madrid, 1963

En universitataj bibliotekoj, fakuloj certe scios trovi Koptalingvajn eldonojn. Krome, ĉiuj verkoj menciitaj ankoraŭ plusendas al aliaj utilaj titoloj.

Sekvas la prelego en traduko<sup>2</sup>. En la sekvonta numero de Dia Regno troviĝos la evangelio.

## Kiam “Hereza” ne jam nomiĝis “Hereza”: bunta Ekkristanismo

**D**e pluraj flankoj mi sciigis, ke tre diligente oni ekserĉis la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*, post kiam la anoncon pri la hodiaŭa tago oni legis. Sed: montriĝis esti tre malfacile: neniuj ŝajne ĝin trovis<sup>3</sup>.

Por klarigo jen kelkvorte:

Ni, en reformaciaj eklezioj, konas en la Biblio sufiĉe grandan aron da ‘verkoj’, el kiuj kelkaj estas ampleksaj, kelkaj malpli grandaj, eĉ foje nur ‘poŝtkart-formataj’. Tiujn verkojn de la Biblio ni kutime dividas en Oldan Testamenton

(OT) kaj Novan Testamenton (NT). – Sed, se trafolumi Biblion eldonitan de Rom-Katolika instanco, tie ne nur troveblas ĉiuj titoloj, kiujn ni konas en la Biblio (kaj OT kaj NT), sed krome inter ili estas kelkaj por ni *novaj* titoloj. La plej famaj el inter tiuj estas ekzemple la libro *Tobit* (aŭ Tobias), la *Makabeoj*, la *Saĝeco de Jesuo Sirah*, la bela rakonto pri *Suzana* baniĝanta. Tiujn librojn la Rom-Katolika Eklezio konsideras oficiale apartenantaj al la Biblio (tiel difinis la Koncilio de Trento), dum en la tradicio sub influo de



Kalvinismo (do ankaŭ ĉe la Nederlanda Bibli-Societo) oni ne konsideras ilin bibliaj verkoj. Mallongadire: ĉio, troviganta en la protestanta Biblio ankaŭ troveblas en la rom-katolika Biblio; sed ĉi lasta krome enhavas kelkajn aliajn titolojn. Nu, ĉi lastajn verkojn, ĉi “mezan grupon” oni nomas la “deŭterokanonaj verkoj” – kvankam protestantaj aŭtoroj foje nomas ilin neprecize “apokrifaj”<sup>4</sup>.

Miaopinie tamen estas pli saĝe, rezervi la terminon “apokrifa” por tute alia kategorio da verkoj. Ekzistas ja aro da verkoj, kiujn neniu eklezio konsideras kanonaj, kvankam ĉu forme ĉu enhance ĉu intence ili ‘povus esti fariĝintaj “kanonaj” en iu ajn formo’. Origine grandparte iliaj aŭtoroj kaj iliaj unuageneraciaj legintoj intencis kaj konsideris ilin minimume same seriozaj kiel la ‘normalaj’ verkoj en la Biblio, ĉu OT ĉu NT. Kaj tiujn do librojn, kiuj iel ‘malsukcesis’, maltrafante la kanoniĝon en la Biblio, ni nomas “apokrifaj”, laŭlitere ‘apokrifa’ signifas nur ‘kaŝita’, ĉar la frua Eklezio ilin je certa momento / stadio de sia evoluo ekkaŝis, por ke la kredantoj ilin ne plu legu.

Espereble ĉi distingo nun estas klaraj.

Unuflanke la Biblio, kun en ĝi: a) la verkoj de OT; b) la ‘duakanonaj’ verkoj nur uzataj de la Rom-Katolika Eklezio<sup>5</sup>; c) la verkoj de NT — kaj aliflanke la libroj, kiujn neniu eklezio akceptis kiel kanonajn: la ‘apokrifajoj’.

Nu, unu el tiuj apokrifajoj estas la *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*. Do, en neniu Biblio-eldono oni ĝin renkontos.

Demando: do kie jes, se ne tie? – Unualoke en sciencaj eldonaĵoj, en studaĵoj troveblaj en universitataj bibliotekoj. Mi mem estas tradukanta plurajn tiajn apokrifajn evangeliojn en Esperanton. Post kelkaj jaroj ili devos aperi<sup>6</sup> – se ĉio iros laŭintence. Konklude: por ne-fakulo estas ĉiam hazardaĵo, se tian apokrifan evangelion oni trafas ie, ĉar la sciencajn

eldonojn ne-fakulo ja ne ofte konsultos, ĉu ne?

Ni tuj eklegos la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*; tiel ni nomas ĝin kutime. Ne, ke Maria ĝin verkis, ĉar ne estas sciate kiu ĝin verkis, eĉ ne certas, ke virino ĝin verkis. Certe Maria Magdalena ne povas esti la aŭtorino, ĉar ĝi datiĝas de tro malfrua epoko. Fakte, same kiel ĉe la granda plimulto de la apokrifajoj, ankaŭ ĉe tiu ĉi teksto ni nur povas konstati ĝian anonimecon.

Antaŭ eklego ankoraŭ du avertojn miaflanke, aŭ eble tri:

- a) la *Evangelio* estis nur fragmente trovita; do vi ne ektimu, se foje iu frazo iom fremde konstruiĝas aŭ ne bone fluas.
- b) por komenci mi prezentos al vi nur la fragmenton, kiun jam en 1896 oni retrovis en Egiptujo en la Helena lingvo. La Helena estas la originala lingvo; multe pli poste oni ankoraŭ trovis fragmentojn en la Kopta<sup>7</sup> lingvo, sed tiujn mi donos poste al vi. Espereble aŭtomate komprenebliĝos la kialo por tio. Se necese, mi poste klarigos.
- c) vi bonvolu legi ĉi tiajn tekstojn kiom eble plej senantaŭjuĝe; intence mi ne donas anticipe interpretojn. La enhavo mem estu centra: provu mem tute freŝe legi ĝin, sciante, tamen, ke ĉi tiu teksto datiĝas el pli malpli 100 ĝis 150 p.Kr.

(la sekva fragmento estis trovita en 1896 en Egiptujo en la Greka lingvo. Maria ĵus rakontis pri vizio, kiun ŝi sola estis ricevinta de la Resurektinta Jesuo.)

(.....) la kvieto, la tempo (.....)

Tion ĉi dirinte, Maria silentiĝis, ĉar ĝis tiam parolis al ŝi la Savinto.

Sed Andreas ekparolis al la fratoj: Kion vi opinias pri ĉi diraĵoj? Ĉar mi ja ne kredas, ke la Savinto tion diris: ĉar ĝi ja estas klare deviaj ideoj.

Petro ekparolis kaj parolis jene: li demandis pri la Savinto: Ĉu li do, preterante nin, kaŝe, parolis al virino? Ĉu ni do turniĝu kaj ĉiuj ekaŭdu ŝin? Li ja ne volis montri ŝin pli valora ol ni?! ...

Tiam Maria, plorante, diris al Petro: Petro, mia frato, kion vi ekpensas? Ĉu vi kredas, ke tion ĉi mi imagas en mia koro, aŭ ke mi mensogas pri la Savinto?

Levi ekparolis kaj diris al Petro: Petro, ĉiam koleriĝemo vin jam ĉeestas; nun mi vidas, ke vi diskutas kun ĉi virino, kvazaŭ kun kontraŭulo. Se la Savinto ŝin opiniis digna, kiu do estas vi por ŝin malŝati? Estas certe, ke la Savinto ŝin tre bone konis kaj ke tial li ekamis ŝin pli ol nin. Prefere ni hontu! Ni vestu nin per la perfekta Homo kaj <ni plenumu> nian taskon, ni prediku la evangelion, neniom limigante nek leĝofarante, krom laŭ kion diris la Savinto.

Tiam Levi (...) kaj ili foriris por prediki la evangelion.

Disdoninte ĉi tekstofragmenton, mi donis iom da tempo, por ke la ĉeestantoj legu ĝin plene atente. Post tio estiĝis interparolo pri tio, kion oni trovis en ĝi interesveka aŭ neatendita k.s.

Oni i.a. menciis la fakton, ke – ŝajne – jam tiel baldaŭ oni povis uzi la esprimon Savinto por Jesuo. Tiu vorto ja sonas tre ortodoksa; kelkaj nomis ĝin eĉ karakterize ortodok-protestanta: mirante, ke ĉi praa teksto jam tiel parolas. La dua afero, kiu estas menciita, estas la fakto, ke temas pri kvazaŭ interbatalo inter viroj kaj virino pri la demando, kies parolo havu valoron. La viroj (krom Levi) emas bagateligi aŭ senfortigi la rakonton de Maria, kiu tamen atestas, ke jes tiel diris Jesuo: ŝi havis mesaĝon de li. Do ŝi devas atesti pri ĝi. Sed Andreas eĉ nomas ĝin ‘deviaj ideoj’: tio do implicas, ke jam estas ekestiĝanta certa dogma vortigo de la fido. Plue menciita estis, ke enestas la kontraŭeco inter la emo babiladi kaj la emo ekaktivi, ekagi: Prefere ni hontu, ni ekagu, ni prediku.

Post la paŭzo, mi jene daŭrigis:

La historion ĉiam verkas la venkintoj. Kaj ne nur la historion politikan aŭ militistan. Se, ekzemple, ne la aliancanoj estus venkintaj la Duan Mondmiliton, sed faŝistoj kaj naziistoj, sendube la nunaj histori-libroj aspektus absolute malsame. Sed la sama vero ankaŭ validas en la religia historio. Kvankam por multaj homoj tio ĉi nepre ne estas same klara.

En la hodiaŭa Ekumena Movado foje aŭdiĝas, ke unu el la celoj de Ekumeno estu: retroiri al la origina Unueca Eklezio de la Ekkristanismo. Rekonstruo de la perdita unueco: sonas bele, sonas romantike preskaŭ – sed: bedaŭrinde, ne estas plene reale tiel paroli, ĉar Kristanismo neniel komenciĝis kiel io unueca. Kaj tamen: vivas ĉe multaj ĉi bildo de praanueco perdiĝinta. Jen, do, en la praktiko, tre klara ekzemplo de tio, ke la historion verkis la venkintoj.

---

Kiel envere aspektis  
Kristanismo en la unuaj  
jarcentoj, se ĝi do ne estis  
unueca, unuforma?

---

Kiel envere aspektis Kristanismo en la unuaj jarcentoj, se ĝi do ne estis unueca, unuforma? Schillebeeckx (Ŝhilebēks) en siaj libroj *Kerkelijk Ambt* (1980) kaj *Pleidooi voor mensen in de kerk* (1985) priskribas tre detale la formiĝon de la ekleziaj oficoj. La unuaj lokaj eklezioj / komunumoj / ἐκκλησία estis ege malsamaj en multaj rilatoj. Ni prenu la organiziĝon. Jam epoke de la verkado de NT (do sufiĉe frue!) ekzistis ekzemple eklezioj (Korinto ekzemple) kie ĉiu surbaze de la inspiro fare de la Spirito povis kontribui la sian al la komuna tut-aĵo, ĉu viro ĉu virino, pere de profetado, parolante en lango-lingvoj, sanigante, instruante, kun apogado, kun gvidado, kun interpretado ktp – sen ajna klara

sistema strukturo de oficoj en eĉ nur iom formala senco; – apud tio ankaŭ ekzistis eklezioj lokaj (en pliposta evoluo paŭlana / duapaŭla) kie oni havis certan tasko-division: tie oni konis apostolojn, profetojn, evangelistojn, paŝtistojn kaj instruistojn unu apud la alia – do ne plu ĉiu povis ĉion fari laŭ la momenta inspiro, sed difinitaj homoj havis difinitajn taskojn: jen ekiĝo, oni povus diri, de la eklezia ‘ofico’; – en la leteroj al Timoteo kaj Tito, 1 Petro kaj Jakobo jam renkontiĝas evoluo iom pli detaliĝinta: tie oni ekparolas pri ‘episkopoj’ (= kontrolisto / inspektisto, kiel unu-persona gvidanto de la eklezio) apud ‘presbiteroj’ (= pliaĝuloj kiel helpantoj de la ĉefa kontrolisto), kvankam en la samaj leteroj – do ankaŭ en ties eklezioj – foje ambaŭ terminoj estas ankoraŭ uzataj sendistinge por la samaj personoj. Samepoke estis verkita la *Didakĥeo*<sup>8</sup>, en kiu ankaŭ estas parolate pri migrantaj profetoj apud la lokaeklezie loĝantaj kaj agentaj instruantoj kaj ‘episkopoj’, kiujn oni elektu mem, ktp (pri profeto profitema oni sufiĉe akrate konstatas, ke tiu estas falsa profeto: do ekestis certa ‘problemo’ pri oficantoj). En *Agoj de Apostoloj* i.a. estas menciite, ke certa Filipo havas plurajn filinojn, kiuj oficas kiel profetinoj. Krom tio ekzistas ankaŭ eklezioj (ekz. tiu, kiu liveris al ni la *Evangelio laŭ Mateo*), kie oni ĝenerale estis tre retenema rilate ajnan oficialan formalan oficon; laŭ la Johano-evangelio ĉiuj senescepte kredantoj havas la Spiriton, kaj sekve specifaj oficoj ŝajne estas superflujaj. Sed, kiel montras la Johano-leteroj, tuj kiam ek-estas problemoj en tiaj eklezioj, en ĉi Johano-eklezioj oni staris tre sendefende, senhelpe. Mankis aŭtoritato.

La demando, kiun komence mi starigis: Kiel en la unuaj jarcentoj aspektis Kristanismo? – nu, laŭ la verkoj ĉi-temaj de Schillebeeckx ni iom vidis, ke en la diversaj lokaj eklezioj oni en multaj tre

malsamaj manieroj klopodis trovi ian ‘formon’ por la eklezia komunumo. Foje tute sen specifa strukturo, unuavide; foje kun tre klara taskodivido; foje kun subordigo sub unupersona gvidado; foje kun nur viroj ĉe-kape; foje virinoj egalrajte je viroj gvidis la eklezion; ktp.

Se ekstrakti aliajn terenojn, ni povus prezenti superrigardojn pli-malpli similajn: ekzemple pri la enhavo de la fido: la demando: Kiu finfine do estas Jesuo? Kio li estas precize dirite? – Por unuj iu Dio maskita kvazaŭ homo; por aliaj vojmontranto, kiu instruas al ni homoj kiamaniere atingi la iluminigon; por aliaj grandega profeto; aŭ anĝelo; aŭ filo de iu Dio, kiel la Romia-Helenisma mondo ja konis multajn, ktp ktp.

Pri etiko io tia. Ekzistis eklezioj kristanaj, kie la ĉefaj demandoj etikaj estis je la tereno de: ĉu kristano rajtas jes aŭ ne ĉeesti teatran prezentadon? ĉu virino rajtas iri surstrate sen vualoj? kiomfoje ĉiutage oni preĝu la Patronian? kiaj manĝaĵoj estas permesitaj / malpermesitaj? ktp ktp; sed aliaj ekzistis, kie gravegis: Kio estas antaŭdestino? aŭ kiom la homaj agoj influas ĝin (aŭ inverse)?; ree aliaj plimalpli imitis la Romiajn-Helenismajn popularegajn filozofojn, kunteksante listigojn de tio, kio ‘decas’ aŭ ne.

Ree aliterene: Ekzistis eklezioj tre malfermitaj, kie ĉiu alveninto, ĉu Judo ĉu ne, ĉu kristano ĉu ne, estis senplie bonvena kaj povis partopreni en ĉio, eĉ en la Sinjormanĝo; aliflanke ekzistis grupoj tiom fermitaj, ke nur post longa studado kaj iniciĝo oni rajtis partopreni la misterojn de la fido, en la eŭkaristia celebrado.

Mallongadire: ekzistis ja tiom da diferencoj.

Kaj ĉiuj tiuj komunumoj / eklezioj / grupoj da Jesu-kredantoj / Jesu-fidantoj aŭ kiel ajn nomi ilin: ili ĉiuj diskonigis al la ĉirkaŭa mondo sian interpretadon, sian

komprenon pri Jesuo de Nazaret. Kaj ili verkis leterojn, reciproke, al eklezioj vizitotaj, al eklezioj kie antaŭe oni laboris, al kolego-eklezi-gvidantoj, al kunreligi-anoj de la propra tendenco, ktp. Kaj evangeliojn ili ankaŭ verkis, ĉiu laŭ la propra eklezia vivo kaj tradicio<sup>9</sup>.

Kaj reciproke ili klopodis por konverti la ceterajn, por ke ili fariĝu ĉiam pli bonaj kristanoj.

Kaj apud ĉio ĉi, kaj eĉ rekte tra ĝi, estis la neceso defendi la religion kontraŭ la ĉirkaŭa mondo. Unuflanke ĉe la tumultoj, se en kvartalaĉoj pogromoj okazis kontraŭ kristana areto (Tertuliano tion ironias: pri ĉiu publika katastrofo, pri ĉiu popola malagrablaĵo, de la komenco de la tempo, la kaŭzo ĉiam estis serĉata ĉe la kristanoj. Se Tiberio leviĝis ĝis la remparoj, se Nilo ne elverŝiĝas sur la kampojn, se la ĉielo senmovas, se moviĝas la tero, se estas malsato, se pesto – tuj: “La kristanojn al la leono!” – Tion al unusola? *Apologio* XL:1-2.) – ĉar same kiel dum Mezepoko kaj Renesanco en pluraj periodoj la Judoj pri ĉio estis la pekoŝafoj, same tiel en la unuaj jarcentoj ie-tie la kristanoj.

(Kvankam refoje ni memoru: la historion verkis la venkintoj; kaj la imponaj procesioj da martiroj, kiujn priskribis i.a. Sienkiewicz en Quo vadis, almenaŭ parte estas fantaziaj.)

Alia minaco de ekstere estis pli intelektuala: la filozofoj, la scienculoj, kiuj provis pruvi, ke Kristanismo estas ne serioza afero, sed nura amaso da fabeloj, mitoj ktp. Ankaŭ kontraŭ tio oni devis defendi Kristanismon.

Kaj por koncizigi longan historion: ĉi tiu defendo okazis i.a. jene. Oni ek-selektis inter la verkoj kristanismaj: nepre ne plu ĉion la kredantoj legu; la eklezian strukturon oni plifirmigis – kaj antaŭ ol pasis plenaj du jarcentoj, preskaŭ ĉie la virinoj malaperis el la gvidaj pozicioj kaj

oficoj: ĉirkaŭ 250 p.Kr. certa Firmiliano, episkopo, skribas al sia kolego Cipriano pri virino en Kapadocio kaj Ponto (nuna Turkujo): “inter la ceteraj aferoj, per kiuj ŝi forlogis multajn, ŝi ankaŭ ofte kuraĝis fari tion, ke per efika alvoko ŝi sanktigis la panon kaj ŝi ŝajnigis plenumi la eŭkariston kaj oferis al la Sinjoro la oferon kun la kutimaj ritaj paroloj, krome ŝi multajn baptis uzante la kutimajn kaj oficialajn vortojn ĉe la pridemandado, tiel ke en nenio ŝi ŝajne deviiis de la regulo eklezia” – kaj ĉe tio li estis kolera, ke tio (ankoraŭ) okazas. Sed post 300 p.Kr. tia kolero preskaŭ ne plu estas bezonata, ĉar la virinoj tion ĉi simple ne plu faras.

Krom tio finfine ĉiu loka eklezio ekhavis strikte unupersonan gvidadon, ja ekestis eĉ superstrukturo super pli-malpli la tuta tiuepoke konata mondo: kun la Patriarkuoj de Jerusalemo, Aleksandrio, Antioĥio, Romo kaj pliposte Konstantinopolo – kaj en Okcidento tio fine rezultis en la Papecon.

Kaj kion pri la senfine bunta variado de la unua Kristanismo? Grandparte ĝi malaperis, ĉar pluraj eklezioj adaptiĝis, absorbiĝis, asimiliĝis je la t.n. ‘ortodoksa’ Eklezio, kiu formiĝis, tre unueca, multe pli fortika ol antaŭe, kun slogano kiel *Ekster la Eklezio neniu savo*. Vidu Ciprianon kun ties verko *La unueco de la Katolika Eklezio*.

La ceterajn, kiuj ne absorbiĝis, kiuj ne asimiliĝis, kiuj ofte ankoraŭ dum jarcentoj plu ekzistis: tiujn la Granda ortodoksa Eklezio eknomis ‘herezaj’.

Tio koncernas i.a. la ekleziojn, kiuj ekzistis en Palestino, en Sirio, en Mezo-potamio (nuna Irako), kiuj en multaj specifaj trajtoj retenis la etoson kaj teologion de la Jerusalema eklezio de Jakobo: herezaj oni eknomis ilin ... La ekleziojn en Malgrand-Azio (nuna Turkujo) kaj Nord-Afriko (nuna Tunizio) kie unu profeto, Montano, kaj du profetinoj dis-

vastigis la t.n. Montanismon, iom paren-  
can je la nunaj Pentekostalaj eklezioj:  
herezaj oni ilin nomis ... La ekleziojn, kie  
Jesuo oni rifuzis senplie kvazaŭ identigi  
je la Patro: herezaj tiujn oni nomis ...

Eble oni povas diri, sociologie, ke la  
estigo de fortika strukturo unuforma estis  
necesa por Kristanismo, por ke ĝi pluvivu  
– meze de pogromoj kaj intelektulaj  
atakoj, meze de ŝtataj persekutoj kaj  
skeptikismo, kaj meze de la amasego da  
konkurencaj religioj tiuepokaj. Eble estis  
iasence vivbezono por pluvivi, tuta tiu  
serĉado de unuforma unueco: la fiksado  
de kanono de sanktaj skriboj (NT); la  
difinado de plejprecize fiksitaj roloj por  
viroj kaj virinoj en la eklezio, kun la  
episkopa gvido ĉekape; la difinado de tio,  
kion oni devas kaj rajtas kredi – kaj kion  
ne – refoje: eble certasence tio estis viv-  
bezona por tiuj kredantoj, kiuj subtenis  
tion plenkore kaj plenforte, sed kiel  
historiisto samtempe oni devas konstati,  
ke Kristanismo povus esti formiĝinta tute  
alie: ekzemple kun multe pli da egaleco  
inter la seksoj, kun malpli da difinado  
religia, malpli da teologio, kun multe pli  
da spaco por la empiria flanko, la spertiĝa  
flanko de religio (ĉar kiel ajn ‘sciencece-  
teorie’ oni priskribu dogmojn, *origine* eĉ  
la dogmoj ekestis el fakta travivado, el  
religia empirio de difinitaj homoj: sperto,  
travivo estis decidiga!)

Granda nombro da tiuj, kiujn oni  
eknomis herezuloj, kutime estas kolektive  
nomataj ‘gnostikuloj’.

Kaj ĉar la *Evangelion laŭ Maria*  
[*Magdalena*] oni atribuas al la gnostiko,  
por fini mi volas ankoraŭ iom paroli pri  
tiu temo.

Gnostiko devenas de *γνῶσις* (gnosis);  
tio estas Greka vorto por ‘scio’ aŭ ‘kono’.  
Sed la malnovaj Grekoj posedis ankoraŭ  
alian vorton pli-malpli samsignifan:  
*ἐπιστήμη* (episteme). Sed tiu lasta vorto  
estas ‘scio’ en scienca senco: provebla,

bazita je rezonado. Gnosis estas scio ali-  
speca, scio bazita prefere je travivo, je  
persona sperto; ekzemple kun iu homo  
oni vivas intime longan tempon: tiun  
homon oni do ekkonas, pri li / ŝi oni  
ekhavas ‘scion’. Certe, sed nepre ne  
scienca scion, sed spertadan. Gnosis:  
tiun vorton oni ankaŭ povas uzi ĉe la  
religio. Kredo, fido je Dio, estas i.a. bazita  
je sperto, je sento de apudeco de Dio, de  
vivado kun Dio. Kaj tio estas tute alia  
afero ol scienca scio.

---

... ĉe la ekpredikado de la  
unuaj apostoloj ilia sperta  
scio estis decidiga faktoro  
apud aliaj ...

---

Nu, la gnostiko tre forte akcentis la  
spertan scion en la religio. Kompreneble,  
ne nur tie ĝi estis grava: ankaŭ ĉe la  
ekpredikado de la unuaj apostoloj ilia  
sperta scio estis decidiga faktoro apud  
aliaj (ili ja spertis kunvivadon kun Jesuo  
dum ties vivo; ili spertis lian ĉeeston  
ankaŭ post-paske); ankaŭ ĉe Paŭlo, kiu  
Jesuo ne estis koninta dum ties vivo,  
sperto estis decidiga: vidu kiel oni ra-  
kontas pri lia konvertiĝo antaŭ Damasko!  
Estis vere skua sperto! Ankaŭ poste: en  
*Agoj* estas rakontate, kiel Petro surbaze de  
spertita vizio pri iu tuko enhavanta  
ĉiuspecajn ‘malpurajn’ bestojn, mal-  
supreniĝanta el la ĉielo, konvertiĝis rilate  
sian sintenon al ne-Judoj (*Agoj* 10).

Nu, en la gnostiko ĉi sperta scio restis  
treege viva. Kaj multaj simboloj kaj  
formoj kaj bildoj el la Romia-Helenisma  
kulturo estis utiligataj por iom vortigi la  
plej diversajn spertojn religiajn. Ofte tio  
liveras tre buntan tutajon. Sed, por esti  
honestaj, mi devas aldoni, ke por simplaj  
nespertaj nuntempuloj ofte iliaj simboloj  
restas sufiĉe enigmaj kaj neklaraj. La  
formoj, kiujn oni utiligis por vortigi, por

pludoni siajn spertojn Di-rilatajn, – tiuj formoj foje estas rekte erarigaj por ni nunuloj.

En la granda vizio, kiun havis Maria Magdalena laŭ la teksto, kiun tuj mi disdonos, temas pri la bildo de Vojaĝo: ŝia animo suprenvojaĝas en la ĉielon kaj dumvoje renkontas simbolajn figurojn. Ja iel pensigas pri Mezepokaj mistikaj tekstoj.

Religia travivita sperto, malfacile balbuta vortigo neklara – iom parenca al mistikaj tekstoj –: jen unu flanko de la *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*. La alia flanko estas la rezisto de certa fluo en frua Kristanismo kontraŭ la pli forta tendenco, kiu provizore estos venka: Maria Magdalena ja agas tre memfide kiel kred-atestantino: Ŝi havas mesaĝon de Jesuo, kiun ne konas la ceteraj; kaj Petro, ŝia oficiala kontraŭulo, rolanta la institut-iĝintan eklezion, tion rifuzas akcepti: Petro protestas: Virinoj en religiaĵoj ja ne povas ekgvidi, direkti. –

Historie rigardante, ni devas konstati, ke – se diri skeme – venkis la linio de Petro: venkis portempe la evolulinio dogmema; la eklezioj, kie estis egalrajtaj viroj kaj virinoj ankaŭ eklezi-office, kie dogmojn oni ne difinis, kie religia travivado, kie sperta scio religia estis esenca dimensio de la fido, – tiuj eklezioj dum la jarcentoj estis kvazaŭ englutitaj de la pli granda pli ortodoksa (pli rektlinie kredanta) eklezio, de la eklezio kun difinita kanono, kun oficoj plurŝtupaj, kun pliklariganta diferencigo inter la pastroj nur viraj unuflanke kaj la nepastra gelaikularo aliflanke ...

En nia epoko tiaj ĉi tekstoj, kiel ĉi *Evangelio*, ie tie retroviĝas, laŭ hazardoj. Se en Mezepoko tio estus okazinta, oni ilin bruligus kiel herezajn, mi supozas. Kaj mi kredas, ke tiu retrovado estas bona kaj utila.

Ne, ke de nun subite ni aliĝu ĉiuj-specajn opiniojn kaj eldirojn de ‘herezuloj’ nur tial, ĉar siatempe ili estis malakceptitaj: tiaj renversigoj neniam havas senco en historiaj procezoj. Krom iliaj eldiroj kaj opinioj ja ankaŭ strangaĵoj estas trovataj: la ‘ortoduksuloj’ almenaŭ plurloke havis certe gravan kialon por malakcepti herezaĵojn; sed aliflanke, inter ĉi tiaj tekstoj, kondamnitaj kiel neakcepteblaj (pro kiu ajn kialo), nepre renkontiĝas aferoj prave inspiraj. – Mi ja kredas, ke estas bone ekkoni la ekestperiodon de Kristanismo. Kaj tiaj ĉi praaĵ tekstoj ĉe tio estas utilaj. – Kaj, ĉu ne?: de pluraj demandoj, kaj de pluraj problemoj tiuepokaj oni ne jam plene kuraĝus aserti, ke ili solviĝis je ĉies kontentigo: ĉio ĉi estis kaŭzo sufiĉa por mi, por ke hodiaŭ mi prezentu al vi la *Evangelion laŭ Maria [Magdalena]*.

(Oni prezentu al si, eklegante tiun ĉi tekston, ke okazas interparolo inter la Resurektinta Kristo kaj aro da gedis-ĉiploj.)

Daŭrigota en sekvonta numero

----

- 1 Mi distingas ĉe miaj VoKo-eldonaĵoj inter la serieto Voĉoj Kristanaj kaj la serieto VoKo-serio.
- 2 Prelegon neniam mi nur voĉlegas, sed depende de la reagoj de la ĉeestant(in)oj mi iom komentas aŭ klarigas diversajn erojn; sed jen la origina formo.
- 3 Intertempe la situacio sufiĉe ŝanĝiĝis: nuntempe tiaj tekstoj pli facile troveblas, minimume rete.
- 4 La Duakanonaj Libroj.
- 5 Pri la situacio en la Orient-kristana Ortodoksio mi intence silentas ĉi tie.
- 6 Daŭris ‘iom’ pli longe: la nuna volumo. Intervenis malrapidige mia traduklaboro super NT kaj Duakanonaj Libroj.
- 7 La vorto kopt etimologie ligiĝas al egipt. Ĝi estas pli nova stadio devena el la praa faraona lingvo.
- 8 Vidu ĉi-volume.
- 9 Vidu ĉi-verke ĉe Apokrifaj evangelioj k.s.

# František Alexander Elstner, ĉeĥa skolto-motoristo

Oldřich Arnošt Fischer

**F**rantišek Alexander Elstner naskiĝis la 11-an de aprilo 1902 en Prago. Li estis unusola filo de komercisto. Ekde la jaro 1913 li sukcese studis en mezlernejo.

En la jaro 1916 li skoltiĝis sub skolta kromnomo Frank kaj eklaboris en Mezlernejana Asocio. Li estis bona sportisto kaj ŝatis aventurojn. Tial li en la jaro 1916 foriris en Ukrainion, kie li enkadre de Internacia Ruĝa Kruco helpis en batalo kontraŭ tifa epidemio kaj subnutrado. Bedaŭrinde tien li foriris sen permeso de direktoro, tial li post reveno estis el la mezlernejo ellasita. Helpe de Ministerio de Edukado li povis fini sian mezlernejan studadon kaj sukcese fari ekzamenon pri matureco en junio 1921. Frank studis en jurista kaj filozofia fakultatoj, sed kaŭze de multe da interesoj li siajn universitatajn studadojn neniam sukcesis fini. Li ellernis germanan, anglan, francan kaj hispanan lingvojn, primajstris multe da sportoj, ekzemple kanuistikon, arkpafadon, futbolon, volejbalon, skiadon kaj bokson. Li kontribuis en skol-tajn ĵurnalojn kaj amatore ludis teatron.

En Parizo li partoprenis en internacia skolta kongreso. Tie li konatiĝis kun britia oficiro Robert Baden-Powel (1857–1941), unu el la fondintoj de la skolta movado. Kiam la unua skolta renkontiĝo okazis en Prago (junio-julio 1922, Císařský ostrov), profesoro Antonín Benjamin Svojsík (1876–1938), fondinto de ĉeĥoslovaka skolta movado, kontraktis kun britiaj skoltoj, ke du ĉeĥoslovakaj skoltoj (Frank Elstner kaj Ernie Dick) partoprenos en staĝo (Wood

Badge) en skolta trejnada tendaro en Gillwell apud Chinford. Kia la trejnado estis? Vera kanada indiano la skoltojn instruis legi spurojn de bestoj kaj homoj. Lignohakisto skoltojn instruis labori kun ligno. Maristo ilin instruis pri nodoj. Tial la staĝo en Grandbritio havis por Frank grandegan signifon. Post reveno Frank kun Svojsík laŭ britia modelo en aŭgusto 1923 en Ĉasarbaro Jemčinská apud Jindřichův Hradec aranĝis kurson por 22 ĉeĥoslovakaj skoltoj taĉmentestroj. En la jaroj 1924 kaj 1925 Frank sole instruis skoltojn en Valo Drhlenské apud Mnichovo Hradiště.

Li fariĝis instruisto en baza lernejo de Stará Boleslav. En la jaro 1925 li edziĝis al Eva Růžena Tomešová kaj en marto 1926 ilia filo René naskiĝis.

Ekde la jaro 1918 Frank kontribuis en ĵurnalon *Motor Revue* kaj helpis al fondiĝo de kelkaj motoristaj kluboj (ekz. Ligo de Ĉeĥoslovakaj Motoristoj, Aero Car Club). En la jaro 1927 lia unua libro *Kniha o uzlech* (Libro pri Nodoj), estis eldonita.

Ekde la jaro 1929 li povis instrui la disciplinon “Scienco pri Motoroj” en lernejo por entreprenantoj.



Lia unua propra aŭtomobilo estis Praga Piccolo, per kiu en aŭgusto 1930 li kun siaj familianoj vojaĝis en Dubrovnik-on.

Ni devas substreki, ke Frank estis instruisto. Li observis rapidan evoluon de motorismo en Ĉeĥoslovakio kaj sciis, ke precipe infanoj kaj junularo estas oftaj viktimoj de trafikaj akcidentoj. Tial li ilin instruis, kiel travivi en trafiko. Li bone desegnis, eldonis librojn, prelegis kaj en siajn prelegojn invitis eĉ verajn profesiajn policanojn, kiuj al infanoj montris, kiel homoj devas observi signalojn de semaforo kaj de la policanoj.

En la jaro 1932 fabriko Aero al li pruntedonis unucilindran aŭtomobilon Aero 500. Frank, Eva kaj ilia amiko Vladimír Kavalier veturis al Adriatio (3 353 km). Ilia vojaĝo estis sukcesa, tial Frank povis fari aliajn ekskursojn kun prunteprenitaj aŭtomobiloj.

Eksterlandaj vojaĝoj de Frank helpis prezenti kaj vendi ĉeĥoslovakajn aŭtomobilojn eksterlande. Krom tio Frank ĉiam raportis al teknikistoj kaj konstruktoroj pri difektoj, kiujn li survoje devis ripari.

En la jaro 1933 estis aranĝita ekspedicio en Afrikon. Partoprenantoj de la ekspedicio Aerospexor havis tri aŭtomobilojn Aero 18 HP kun ducilindraj motoroj (662 cm<sup>2</sup>). Ili dum 42 tagoj veturis el Prago trans Italio al maro, vizitis Libion, Tunision, Alĝerion kaj Marokon, revenis trans Hispanio, Francio, Italio kaj Aŭstrio (14 000 km).

En la jaro 1934 ekspedicio de kvar aŭtomobiloj Aero 1000 okazis. Blua koloro tiam estis nekutima, ĉar la aŭtomobiloj Aero kutime estadis aŭ ruĝaj aŭ blankaj. Granda senzacio estis la partopreno de ses junaj virinoj, kiujn akompanis Frank Elstner kaj Bohumil Turek (1901–1972). La virinoj ne estis komentantinoj, sed spertaj motoristinoj. La

veturado daŭris 48 tagojn. “Blua Teamo“ vizitis Alĝerion kaj Marokon (17 600 km).

La ekspedicio estis sukcesa, ĉar ĝi montris bonan kvaliton de ĉeĥoslovakaj aŭtomobiloj, per kiuj eĉ virinoj kapablis veturi en danĝera tereno. Por Frank tio estis tre nefacila vojaĝo, ĉar krome teknikaj problemoj li kun helpo de Turek devis solvi ankaŭ kverelojn de ses junaj, temperamentaj virinoj. Kompare kun tio la veturado en Anglion kaj Skotlandon en la sama jaro estis tre facila.

En la jaro 1936 Frank kun sia edzino Eva veturis en Norda Ameriko kaj Meksikio. Ili uzis la aŭtomobilon Škoda Popular en arĝenta koloro. La veturado (25 000 km) daŭris 100 tagojn.

En la jaro 1937 Frank kaj Eva veturis al rumana bordo de Nigra Maro. Ili uzis la aŭtomobilon Škoda Rapid kaj veturis trans Aŭstrio kaj Jugoslavio en Rumanion. Kiam ili revenis, en Rumanio ili vizitis la urbojn Braŝovo, Sibiu, Kluĵo, Satu Mare kaj en Hungario Debrecenon kaj Budapeŝton.

En la jaro 1938 Frank, Eva kaj poste František Lhota vizitis Sudan Amerikon, nome Brazilion, Argentinon kaj Urugvajon. Ili uzadis la aŭtomobilon Škoda Popular, sed ankaŭ trajnon, ŝipon kaj aviadilon.

Dum la dua mondmilito Frank okupigis pri teatro kaj filma arto, sed ne tre sukcese. En la jaro 1945 Frank helpis kiel stiranto de aliancaj politikistoj, kiuj estimis liajn spertojn kaj bonegan scion de fremdaj lingvoj.

En la jaro 1946 Frank divorcis. Lia nova partnerino estis pilzena dancistino Jiřina Zemánková, sed ilia edzeco daŭris nur ses semajnojn. En la jaro 1947 Frank denove edziĝis, nun al Anna Šedivá.

Post la dua mondmilito Frank kontinuis siajn ekspediciojn kun sia edzino Anna Elstnerová kaj 21-jara filo René Elstner. Uzante la aŭtomobilon Aero



Minor II ili veturis en Afrikon. El Alĝerio ili veturis al Guinea Golfo kaj reen.

Frank Elstner ne povis scii, ke tio estis lia lasta libera veturado. La 25-an de februaro 1948 ĉeĥoslovakaj komunistoj faris sukcesan puĉon kaj ekregis por longa 41-jara (1948–1989) epoko de socialismo. Ili ne estimis, ke Frank jam faris multon por sia patrujo. Ili uzis nek liajn lingvajn spertojn nek liajn eksterlandajn kontaktojn. Homoj, kiel fiera skolto kaj elstara vojaĝanto, Frank, kiu ŝatis liberecon kaj amikiĝis kun Baden-Powel, estis por socialismo danĝeraj.

Nur post 12-jara paŭzo, en la jaro 1959, Frank povis veturi kun Jan Fiala en Sovetunion. Ilia aŭtomobilo estis Škoda Octavia. Veturado trans Blankrusio (Minsk) en Moskvon devis propagi socialismon. Itinero devis esti aprobita per komunistoj. Elstner devis observi la aprobitan traceon (14 000 km), komunistoj determinis, kien li rajtas iri, kun kiu li rajtas paroli ktp.

La vojaĝantoj vizitis Ukrainion, Krimeon, Kartvelion, Aĝarion kaj Abĥazion, Rumanion (Bukareŝton, Ara-

don) kaj Hungarion (Debrecenon, Buda-peŝton). La libro *Ŝtastnou cestu, Octavie!* (Feliĉan vojaĝon, Oktavia!) el la jaro 1961, estis propagado de soveta socialismo. La veturado en Sovetunion estis la lasta eksterlanda vojaĝo de Elstner. Longtempe preparita projekto de veturado en Ĉinion ne estis permesita. Uzante la saman aŭtomobilon (Škoda Octavia) Frank kun sia amiko kaj tri knaboj veturis en socialisma Ĉeĥoslovakio el la montaro Ŝumava en slovakon montaron Tatry.

Libroj de Elstner estis malpermesitaj. Li ne plu povis verki librojn pri siaj vojaĝoj, tial li verkis malgrandajn utilajn libretojn pri tendaradoj, vivo en naturo kaj metioj. Nur en la jaro 1972 Studio Brno de Ĉeĥoslovaka Televido kreis du filmojn kun F.A. Elstner. La filmoj estis prezentitaj, sed poste ili „hazarde“ malaperis.

František Alexander Elstner (Frank) forpasis la 8an de septembro 1974. Li estas entombigita en Prago-Vinohrady.

☞

## Kiel mi travivis la strangajn tempojn dum la virusa pandemio

Karl Heinz SCHAEFFER, DE

**S**ubite estis ĉio forpuŝita, kio estis memkomprenebla por mi. Unue mi devis solvi, kiamaniere mia edzino kaj mi organizas la ĉiutagan vivon, ĉar ni estis ja preskaŭ enŝlositaj en nia domo kaj en la unuaj tagoj ni nur povis forlasi ĝin por aĉeti la ĉiutagajn bezonaĵojn.

Sed ne ĉiuj vendejoj estis malfermitaj; nur la nutraĵvendejoj, bakejoj, apotekoj, benzinstacioj, kuracistaj praktikejoj estis atingeblaj laŭ mia rememoro, sed nur kun protektilo antaŭ buŝo kaj nazo (masko-devo). Ĉio alia ne povis funkcii, nek gastejoj, naĝejoj, ĉiuj alispecaj

vendejoj, ja eĉ ĉiuj preĝejoj estis ŝlositaj. Diservoj laŭ ĝisnunaj kutimoj ne eblis.

Kaj en Germanujo havas ĉiu federacia lando la rajton, ordoni, kio okazu por preventi infekcion de unu al alia homo, do kio ankoraŭ eblis en unu provinco, jam en la najbara aŭ fora lando ne validis. Do ĉiutage oni ricevis en la novaĵoj kaj gazetoj informojn, kio ek de nun estas permesata aŭ malpermesata tie ĉi aŭ aliloke.

Subite ne plu estis vivo, kiel ĝi estis en la kutima maniero: neniuj piedpilko, neniuj koncertoj, neniuj teatraĵoj, neniuj prelegoj aŭ kunvenoj. Mallonge dirite, ĉie estis nur la vortoj “nuligita” aŭ “fermita”. Kaj tiuj severaj tempoj daŭris 6 longajn semajnojn ĉe ni.

Kompreneble oni travivis dume kelkajn specialaĵojn. Kiam mi volis viziti mian kuraciston, mi ne povis eniri la praktikejon, sed devis kun aliaj atendi en la ŝtuparejo, ĝis unu povis eniri laŭ permeso de asistantino, sub masko.

Surstrate oni devis distancon teni de 1,5 m-oj de aliaj kaj en la unuaj semajnoj povis tiamaniere nur 2 personoj renkontiĝi surstrate.

Je la dua tago de enŝlositeco sonoris afabla juna najbarino ĉe ni kaj volis scii, ĉu ĉe ni estas ĉio en ordo kaj ĉu ŝi povas aĉetadi por ni. Ĉar ni ambaŭ estis sanaj, ni povis dankante rifuzi. Sed en la tuta urbo unu helpis tiamaniere la alian, se tio montriĝis necesa.

Kio ankau iom ĝenis nin, estis, ke la ekzerc-horoj de ĥorusoj ne eblis, ĉar pro distanco, sub maskoj oni ja ne povas orde ekzerci, kaj eĉ ne bele kanti.

Kiam la nombro de malsanuloj en nia subdistrikto kreskis, oni ŝlosis la tutan konstruaĵon, kie la popola altlernejo, la urba biblioteko kaj nia germana Esperanto-Biblioteko troviĝas. Kaj mi momente staris antaŭ nekutimaj ŝlositaj

pordoj. Kiam mi demandis la direktoron de la urba biblioteko, ĉu lia administracio tamen laboras, li jesis, kaj do mi decidis, ke ni ankau laboros en nian bibliotekon, ĉar ĉiuj membroj estis same sanaj kiel ni kaj ni eĉ ne bezonis porti la maskojn.

Momente fine de junio la registaro de nia federacia lando Baden-Virtembergo malfirmigas de semajno al semajno ion, kaj do revenas vivo surstrate, en vendejoj kaj hejme, ĉar intertempe povas renkontiĝi hejme jam homoj el du diversaj domanaroj kaj alie povas renkontiĝi ĝis 50 personoj, sed sub maskoj kaj per 1,5 m-a distanco.

Entute mi ne enuis en la lastaj semajnoj, mi povis multon legi, skribi leterojn kaj informi eksterlandajn gesperantistojn pri niaj cirkonstancoj. Mi memoras i.a., ke mi povis helpi al la edzino Agnes de nia redaktoro Bengt, kiu devis de Svedujo per aŭto veturi al Budapeŝto, dum la kutima trapaso tra Ĉeĥujo kaj Slovakujo pro fermitaj limoj ne eblis, same la kutimaj pramoj ne ĉiuj trafikis.

Pri kio mi ege miris, estis, ke la eklezioj ne donis al ni suferantoj respondojn. La renoma germana gazeto “Welt am Sonntag” titolis artikolon jene: “Ĉu la kronvirsusa krizo fariĝos bankrotdeklaro de la eklezioj?” Al mi ŝajnis la memlimigo de la eklezioj stranga en tiuj ĉi malfacilaj tempoj. Sed ege bonaj estis la virtualaj Diservoj de kelkaj de ni, je la pinto nia pastoro Wolfram Rohloff el la Ercmontaro. Tiu agado estis granda subteno por ĉiuj partoprenantoj kaj monata ripeto jam estis anoncita.

Mi finas nun ĉi tiujn pensojn pri miaj travivaĵoj ĝisnunaj kaj deziras al ĉiuj ni: Restu sanaj!



# Letero pri la pandemia malsano Kovim-19

Honoré Sebuhero, Norda Kivu-Provinco / DR Kongo

Saluton,

*"Mi ankaŭ konfesas, ke la pandemio enhavas nenian negativan efikon sur mi. Mi plene havas la pacon de la Sinjoro kaj viajn mesaĝojn konservas ĉi tiun pacon sendifektan kaj permesas al mi dividi ĝin kun mia edzino kaj miaj kvin geinfanoj. Ni estas modeloj kaj niaj infanoj rigardas, certe sen ni, konstatas, kiel ni administras niajn ĉiutagajn vivojn dum izoliteco. Mi kredas, ke ni devas montri al ili, ke nia fido en Jesuo Kristo estas viva kaj reala."*

Jen kion mia amiko Mikaelo skribis al mi kiam ni ĉiuj estis en izoliteco kaj la koronavirus-krizo senĝene furiozis.

Certe, lia intimeco kun Jesuo faris la diferencon kaj Mikaelo, same kiel mia amiko, inspiris min fari la samon.

Karaj, ni estas nomataj kiel modeloj, certe neperfektaĵoj, delikataj kaj subkonstruitaj, sed modeloj malgraŭ ĉio. Ni povas meti simplajn kaj potencajn

aferojn por inspiri aliajn sekvi Jesuon, komencante de niaj amatoj.

Jen nia versaĵo de la tago, kiu diras: *"Li diris al ili: Sekvu min, kaj mi faros vin fiŝkaptistoj de homoj"* (Mateo 4:19).

Karaj, jen la ŝlosilo helpi aliajn travivi la transformon, kiun Jesuo volas efiki en ili. Por fariĝi modelo, sekvu Jesuon kaj restu konektita al li.

Hodiaŭ akceptu, ke via fido en Jesuo Kristo estas viva kaj reala. Atendu, ke tiuj ĉirkaŭ vi vidas vian asekuron. Ili estos surprizitaj, ĉar ili rekonos vian intimecon kun Jesuo. Memoru, vi estas la lumo de la mondo kaj la salo de la tero, diras Jesuo! Do levu la kapon kaj antaŭeniru.

Gloru Dion!

*"Mi estis en situacio kie mi sentis min kiel en malkonekto kun Dio. Mi perdis mian intimecon kun li pro la malfacilaĵoj, kiujn mi travivis. Miraklo ĉiutage permesas al mi ne rompi la interligon kaj levi min iom post iom."* ☩

## De malsanulo aŭ izolulo



Ho Dio,  
helpu al mi fidi vin,  
helpu al mi scii, ke vi estas kun mi,  
helpu al mi kredi, ke nenio apartigos min  
de via amo  
malkaŝata en Jesuo Kristo nia Sinjoro.

**Amen.**

Tradukis Jack Warren  
Fonto: churchofengland.org

# Kovim-19-pandemio: kio sekvas por la eklezio?

Adebayo Ola AFOLARANMI, Niĝerio

**J**e la alveno de KOVIM-19-pandemio (Koronviroza malsano, angle COVID-19) fine de 2019 kaj la aktuala realo, la mondo neniam povas esti la sama, kaj oni aferojn neniam povas fari kiel antaŭe. Ĉi tio certe influas ĉiun sferon de la vivo, ankaŭ la Eklezion. La adekvata demando por ĉiu ekleziestro kaj eĉ ekleziano: Kio sekvas por la Eklezio en la pandemia periodo de KOVIM-19?

La administrado de la Eklezio ne plu povas daŭri same kiel antaŭ la KOVIM-19-pandemio. Ĉiu ekleziestro devas reiri al la reala Fondinto kaj Fonto de la Eklezio – Dio – kaj serĉi Lian gvidon kiel administri la Eklezion en la post-KOVIM-19-pandemia periodo. Neniu metodo, plano, aŭ strategio povas efike funkcii sen Dia gvidado. Jen tempo, ke ĉiu eklezia estro bezonas la gvidadon de la Sankta Spirito.

Krom Dia gvidado, ĉiu eklezia estro devas studi la unikecon de sia paroĥano kaj loko kaj moderigi kiel respondi al la defioj, kiujn la KOVIM-19-pandemio proponis en la kunteksto de la proproco de sia kongregacio kaj loko. Tio, kio funkcias en Eklezio A, eble ne funkcias en Eklezio B eĉ en la sama loko. La gvida stilo de la ekleziestro estas alia faktoro ĉi tie eĉ se estas similecoj en preĝejoj. Do, la ekleziestro devas koni sin mem kaj kiel li adaptiĝu al la nuna situacio.

Aktivecoj de la Eklezio estu pli dinamikaj en ĉi tiu periodo. KOVIM-19-pandemio kaj ĝiaj ĉeestantaj efikoj malfermas la okulojn de ekleziaj membroj al multaj aferoj, kiujn ili antaŭe

ne sciis aŭ antaŭvidis. Aferoj ne eblas laŭ la malnovaj manieroj en ĉi tiu post-KOVIM-19-pandemia periodo.

Dum pastoroj devas prediki la senŝanĝan Vorton de Dio en ĉi tiu senĉese ŝanĝiĝanta socio, pli multe ili devas fokusiĝi sur bibliaj instruoj pri finotempo. Tiel okazas pro la multaj falsaj instruoj kaj konspiro-teorioj pri la nova monda ordo kaj la fina tempo.

La pastoroj devas plivastigi la uzon de la interreto kaj aliaj teknologiaj iloj en sia pastora servo. Dum la tradiciaj fizikaj rimedoj de pastora servo devas daŭri laŭeble, pastoroj devas pensi kiel fari interretan servon ne nur kiel alternativan servon, sed ankaŭ kiel komplementan aŭ suplementan al la tradiciaj manieroj de pastora servo. Interreta servo pruvas esti vera rimedo por atingi atenton al ekleziaj membroj same kiel aliaj homoj tutmonde.

Preĝejoj devas pli investi en sia multimedia servo. La plurmedia servo implikas kombinitan uzon de teksto, grafikaj aĵoj, aŭdio, filmetoj kaj kuraĝigo por komuniki la evangelian mesaĝon. Multaj aferoj troviĝas sub la ampleksa kategorio de multimedia servo de la Eklezio. Ĉi tiuj inkluzivas sonkvaliton, lumojn, projekciojn de datumoj, predikojn per PowerPoint, muzikaj lumbildoj, registrado de prediko aŭ/kaj muziko, bonvenigaj filmetoj, podkastado, blogoj, retroŝtaj ĝisdatigoj, elektronikaj informiloj, ret-enketoj, bultenaj projektoj, flugfolioj, reklamoj, konservado kaj riparo de komputiloj, KD-duobloj, interretaj kontoj, tele-

fonoj, specialaj eventaj filmetoj, Twitter-konto, Facebook-konto, predikoj ĉe YouTube, SMS, kaj tiel plu. Ĉi tiuj estas kelkaj el la teknologiaj iloj bezonataj en la plurmedia servo: telefonoj, ciferecaj fotiloj, mikrofonoj, amplifiloj, laŭtparoliloj, projekciiloj, ekranoj, televidiloj, bendregistriiloj, video aŭ VCD-registriilo, komputiloj, saĝtelefonoj kaj tabulkomputiloj. Ĉi tiu listo ne estas ĝisfunda. Ĉiam pli multaj iloj eliras preskaŭ ĉiutage. La Eklezio kaj la eklezia gvidado ne devas akiri ĉiujn ĉi tiujn ilojn antaŭ ol komenci multmedian servon kaj okupiĝi pri uzado de teknologiaj iloj por konstrui la servejojn de la loka eklezio.

Pastoroj devas esti trejnita kiel uzi ĉi tiujn ilojn por plibonigi la multmedian servon, kaj iuj ekleziaj membroj ankaŭ devas esti trejnita por helpi la pastorojn kaj la eklezion en la uzado de teknologiaj iloj por la servo. Pastoroj devas konscie instrui eklezianojn povi stari sendependaj de la pastoroj aŭ preĝejoj agadoj dum provaj tempoj. Krom ke la pastoro ne povas servi al ĉiu ekleziano la tutan tempon, kaj la ekleziaj membroj ne povas esti en la preĝejo la tutan tempon, ekleziaj membroj devas esti gvidataj por povi stari solaj sen la pastoro aŭ veni al la preĝejo la tutan tempon por solvi ajnan problemon. Kvankam ĉi tio ne malplaĉas al la graveco de pastora servo kaj kongregacia kunularo, ekleziaj membroj devas konscie esti kondukita al spirita matureco, kiu igos ilin stari en sia fido kun aŭ sen la pastoro aŭ kongregaciaj agadoj. Ĉi tio plifortigos membrojn por lerni serĉi Dion por helpo en vivdaŭraj defioj, ĉu pastoroj estas atingeblaj aŭ ne.

Pastoroj devas trejni al devotajn eklezianojn iujn rudimentojn de pastora servo, por ke tiaj trejnita homoj povu helpi la pastorojn en la pastora servo. Plurpersona servo (tio implicos grupon

de kristanaj homoj – ne nepre trejnita pastoroj – kiuj servas Dion per servado al aliaj membroj de la eklezio por ebligi al la eklezio plenumi siajn misiojn kaj respondecojn) devas esti instigita eĉ en la malproksima aŭ plej malgrandaj preĝejoj.

Kun la aktuala rekompenco de socia/fizika malproksimigo, malpli da emfazo devas esti metita al grandaj kongregaciaj kunvenoj, dum pli da emfazo estu metita al malgrandaj grupoj en formoj de ĉelaj preĝejoj, domaj aŭ hejmaj kunularoj kaj similaj. Ĉi tie necesas la servoj de la spirite maturigitaj ekleziaj membroj, precipe trejnita membroj, ĉar ĉi tiuj homoj servas kiel estroj kaj faciligantoj de la malgrandaj grupoj. La pastoro estos la ĝenerala kunordiganto de la agadoj de ĉi tiuj malgrandaj grupoj. La uzo de interreta servo ankaŭ helpos tiurilate, ĉar la pastoro aŭ sendas siajn antaŭregistritajn mesaĝojn al ĉi tiuj malgrandaj grupoj, aŭ la malgrandaj grupoj aliĝas al la pastoro en viva elsendo de liaj predikoj, bibliaj studobjektoj aŭ preĝaj kunsidoj.

Malpli emfazo ankaŭ estu metita sur konstruo de granda aŭditorio dum pli da emfazo devas esti metita sur agadojn, kiuj konstruos la eklezianojn en iliaj spiritaj vivoj. Grandaj aŭditorioj kaj investado en multekostaj preĝejoj mebloj aŭ ekipaĵo pruis esti malpli gravaj en la periodo de KOVIM-19. Kio pli gravas kaj bezonas pli da atento estas investi en la spirita konstruo aŭ ekipado de la ekleziaj membroj. Konscia disĉipligado de ekleziaj membroj estu pli prioritataj.

Pli da klopodoj devas doni al vizitado kaj prizorgado de ekleziaj membroj per telefonvokoj kaj sendado de tekstaj mesaĝoj. Eklezianoj bezonas la identigon de la eklezio per vizitado kaj zorgado en ĉi tiu KOVIM-19-pandemia

periodo. La pastoro eble ne povos viziti ĉiun eklezian membron. Tamen, la pastoro devas klopodi delegi ĉi tiun taskon al fidindaj homoj, kiuj reprezentos lin ĉe vizitataj ekleziaj membroj kaj revenos al la pastoro kun retrosciigo pri ĉiu vizito farita. Tamen estas malfacile por la pastoro viziti ĉiun eklezian membron, vokante ilin telefone kaj sendante instigajn kaj fidajn inspirajn mesaĝojn, signifas ke ĉiu eklezia membro sentas la zorgadon de la pastoro. Identigi kaj zorgi pri homoj, kiuj vere estas en materiaj kaj financaj bezonoj, estas aliaj rimedoj, por ke ĉiu eklezia membro sentu apartenon en ĉi tiu periodo.

Konklude, eklezianoj devas kunlabori kun siaj pastoroj kaj aliaj preĝejestroj dum ili agordas al la ŝanĝoj de la

post-KOVIM-19-pandemia periodo. Ĉiuj bezonas respondi al la nunaj defioj kaj antaŭenigi la eklezion por antaŭeniri la Regnon de Dio. Ne gravas la situacio, la pordegoj de la infero ne superos la Eklezion.

(Adebayo Ola Afolaranmi [ordinita pastoro de la Konfeso de la Niĝeriaj Baptistoj] havas Magistrecon pri Teologio en Religia Edukado de la Niĝeria Baptista Teologia Seminario, Ogbomoso, Niĝerio kaj Magistrecon pri Filozofio en Konflikta Rezolucio kaj Repacigo de Trinity College Dublin, Respubliko de Irlando. Li nuntempe doktoriĝas [Studio pri Paco kaj Konflikto] de Universitato Lead City, Ibadan Niĝerio. Li kutimis kunordigi la interretan servon ĉe la ĉefsidejo de la Konfeso de la Niĝeriaj Baptistoj, Baptist Building, Oke Bola, Ibadan. Li estas la Ĉefa Respondeculo de La Vorto per la Interreto – servo per la interreto kaj aliaj teknologiaj iloj.)

☞

## Neniu kongreso pro la pandemio ... ... sed kvar retaj diservoj

### Kongreso

Pro la pandemio, la ĉi-jara planita kongreso en Legnica, Pollando, ne okazis. La Estraro kaj la loka komitato esperas, ke la situacio sekvontjare estos pli favora, kaj decidis prokrasti la kongreson ĝis aŭgusto 2021.

### Diservoj

Pro la granda kaj laŭdinda laboro de Wolfram Rohloff kaj liaj pluraj diverslandaj kunlaborantoj, dum la pasintaj monatoj kvar diservoj estis dissenditaj pere de Jutubo [Youtube]. Se vi volas aŭskulti ilin, vi trovos ilin je la jenaj retaj adresoj:

29. mar 2020: [www.youtube.com/watch?v=0s6oyJm0F0Y](http://www.youtube.com/watch?v=0s6oyJm0F0Y)

25. apr 2020: [www.youtube.com/watch?v=goI0xPeRRis&feature=youtu.be](http://www.youtube.com/watch?v=goI0xPeRRis&feature=youtu.be)

30. maj 2020: [www.youtube.com/watch?v=h0lLmCYxIN0&feature=youtu.be](http://www.youtube.com/watch?v=h0lLmCYxIN0&feature=youtu.be)

8. aŭg 2020: [www.youtube.com/watch?v=AxHi76o4kkM&feature=youtu.be](http://www.youtube.com/watch?v=AxHi76o4kkM&feature=youtu.be)

Aliĝu al la gruplisto [diaregno@yahoogroupes.fr](mailto:diaregno@yahoogroupes.fr) por ricevi informon! Philippe Cousson estas administranto de la gruplisto ([philippe.cousson@sfr.fr](mailto:philippe.cousson@sfr.fr)). Anoncu vin al li!

Justorum animae (Saĝ. 3,1-5)  
por miksa koruso (SATB) & akompano

Christoph Dalitz (2020)

G E7 Am

La a· ni· moj de la jus· tu · loj es· tas en la ma· no de Di · o  
kaj tur· men ·

**Estimataj**

mi daŭrigas verki liturgian muzikon en Esperanto. Eble ĝi estas uzinda por korusanoj inter la legantaro de “Dia Regno”.

***Justorum animae por SATB***

Registrado: <https://www.youtube.com/watch?v=MLmHwKL-Pvs>

Muziknotoj: <http://music.dalitio.de/choir/dalitz/justorum-animae/>

Eble tiu kanto estas tiom bela, ke eĉ korusoj kutime ne kantantaj esperantlingvaj pecojn volas kanti ĝin...

***Gaudeamus omnes por du voĉoj***

Registrado: <https://www.youtube.com/watch?v=vG2wS8mtrCQ>

Muziknotoj: <http://music.dalitio.de/choir/dalitz/gaudeamus-eo/>

La stilo de tiu peco estas iom freza kaj verŝajne ne multaj ŝatos la rezulton, sed mi konsideras ĝin sukcesa.

Korajn salutojn,  
*Christoph Dalitz*

IN FESTO OMNIUM SANCTORUM

AUDE- AMUS \* omnes in Dó- mi-  
no, di- em festum ce- le- brántes

# Venu, Spir', kaj faru novaj

VEM, Ó TU QUE FAZES NOVOS



1. Ve-nu, Spir', kaj fa-ru no-vaj—  
Al la vort'— Vi do-nu sen-son—



la sis - te - mojn de l' pen - sad'.  
kaj pro - fun - don al vi - dad'.



Ve - nu, tu - ŝu ni - an te - ron, —



du - ran ki - el ma - ka - dam'.



En ĉi val' de os - toj se - kaj —



spi - ru viv' — kaj flo - ru am'.

2. Per ĝemad' neeldirebla  
preĝu Vi en nia kor',  
kaj per ard' neestingebla  
prenu nian fridon for.  
Via ŝtorm' la ĉenojn rompu:  
al liber', al nova far',  
kontraŭ prem' kaj ekspluato,  
por la bon' de l' kreitar'.

3. Venu, Spir', ho don' de Dio,  
stopu per racia fort'  
la strukturojn de l' malbono,  
la maŝinojn de la mort'.  
Veku pac-projektojn novajn,  
sen kanon' aŭ destrojler'.  
Inundigu niajn tagojn  
per mirakloj kaj esper'.

VEM, Ó TU QUE FAZES NOVOS • Textes pour la semaine de prière pour l'unité des chrétiens et pour toute l'année, p. 18 • M kaj portugala T: Simej Monteiro • © hispana T: Juan Gattinoni • © angla T: Shirley Erena Murray • © franca T: Marc Chambron • © germana T: Reinhold Renner • E: Albrecht Kronenberger 2015-01-02

1a strofo: kp. Jeĥ 37; 2a strofo: kp. Rom 8,26; 3a strofo: Johano Paŭl la 2a, Sollicitudo rei socialis, Nr. 36 • Eugen Drewermann, Strukturen des Bösen, Paderborn 2014